11ª MARKOLA KONGRESO

28-a de APRILO – 1-a de MAJO
1973

BONVOLU NOTI:-

Por faciligi la taskon al
la estro de Continental
Hotel, ni petas al Kongresanoj
ke ili kvitigu siajn hotelkontojn
plej malfrue la vesperon antaŭ
sia foriro.

ESTU BONVENAJ!

Geamikoj el pluraj landoj kunigas denove por sin amuzi dum kelkaj tagoj en la kadro de nia neformala Markola Kongreso. La dek-unua! Evidente la semo plantita de Norman Smith enradikiĝis en la aktivado de la esperantistoj, eĉ abunde floras ĉiujare!

La kongresantoj en Ramsgate, ni tion konscias, venas nek por ĉeesti jarkunvenojn - da kiuj ekzistas multaj en aliaj medioj - nek por legi nenecesajn artikolojn kia ĉi tiu.

Sed, momenton!

Inter ni hodiaŭ estas novaj Markolanoj. Konatiĝu kun ili! Ankaŭ pluraj junaj gekomencantoj. Bonvenigu kaj helpu ilin! Krome kelkaj ne-esperantistoj: edzinoj kaj familianoj kiuj akompanas fervorajn Markolanojn. Ili estu bonvenaj - ni povas ilin kuraĝigi al lernado de nia magia lingvo. Se ili lernos nur dudekon da vortoj aŭ esprimoj ĉe ĉiu kongreso, ili baldaŭ scios sufiĉon!

DANKON!

Al niaj gastoj kiuj proponis sian kunlaboron por sukcesigi diversajn erojn de la Kongreso kaj al la hotelestro, kiu, malgraŭ profitdonaj hokeistoj en la urbo, tamen preferis akcepti esperantistojn, ni jam esprimas tutkorajn dankojn!

Ne pafu la organizintojn: Margaret Smith
Johano Rapley
Helga Rapley
Muriel Benson
Gordon Hawker

RAMSGATE

Nia kongresurbo rajtus pretendi ke ĝi estas la naskiĝloko de la angla lingvo. En la apuda Pegwell Bay - hodiaŭ albordiĝejo de la teraplanoj - en la jaro 449 alvenis la unuaj saksaj enmigrintoj, Hengist kaj Horsa. Je ilia memoro oni starigis sur herbejo ĉe Pegwell Bay vikingan ŝipon, nomita "Hugin", unu el la vidindaĵoj de la regiono.

Inter la 5a kaj 18a jarcentoj Ramsgate trankvile ekzistis kiel fiŝkaptista vilaĝo kaj poste urbeto. En 1795 ĝia haveno ricevis la titolon "reĝa haveno" de George IV. Ĝiaj du basenoj enkadrigitaj de du fortaj ŝtonaj marpontoj baldaŭ igis ĝin jaŭtparadizo kaj ideala feriejo por amatoraj fiŝkaptemuloj; kaj tia ĝi restas ĝis hodiaŭ.

Promenante tra la nuna urbocentro oni trovas la kutimajn ĉefstratajn butikojn, magazenojn kaj restoracietojn, sed la apudmara regiono proponas al la vizitanto belan pejzaĝon kaj ampleksajn eblecojn por sin okupi:- sabla strando kaj laŭmarborda promenejo, modela vilaĝeto ĉirkaŭita de miniatura angla kamparo tia kia ĝi estis en la periodo de la Tudoraj reĝoj, tipe brita parko (Ellington Park) naĝbaseno, golfejoj (miniatura kaj granda) tenisejo, kompreneble kriketejo kaj futbalejo (sen kiuj neniu brita komunumo estus vivkapabla) infanamuzejo kun vagonaretoj, karuseloj rajdeblaj azenoj ktp. kaj "Jackey Baker's Sports Ground" internacie fama pro siaj hokeaj festivaloj.

HOKEO

Iom bedaŭrinde la koincido de unu tia festivalo kun nia kongreso iom reduktos la influon de nia ĉeesto, almenaŭ sur la ĝeneralan publikon, sed malfermos por ni okazon prezenti al la hokeantoj nian solvon al ilia lingvoproblemo.

MANĜOJ

Leviĝas praktika problemo rilate al tagmanĝoj: hokeistoj havas grandan apetiton kaj eble ili plenigos ĉiujn moderprezajn restoraciojn en la urbo. Ni konsilas tial, ke oni aŭ prenu sandviĉon kaj trinkaĵon en la trinkejo de la Kongresejo aŭ aĉetu manĝeblaĵon en butiko.

HOTELO CONTINENTAL

Vespere tamen ne estos problemo. En la Kongresejo oni servas adekvatan tripladan ĉefmanĝon al ĉiu gasto de la Continental kaj al ĉiu kiu ĝin mendis je alveno.

La hortabelon de la manĝoj vi trovos en la programo kun la escepto de la "frumatena teo" kiun oni servas al gastoj de la Continental ĉirkaŭ la 8a horo sen aldona pago kaj sen antaŭa peto. Tiu kiu volas eviti tiun barbaran britan kutimon devas peti al la hotelo: "No early morning tea"! Dum la matenmanĝo oni servas aŭ teon aŭ kafon laŭ via peto. Angla kafo ĝenerale estas evitinde malforta kaj plenplena de lakto. Se vi deziras nigran, necesas diri "black coffee".

Je la noktomezo oni ŝlosas la ĉefportalon de la hotelo.

POR AŬTISTOJ

Tuj malantaŭ la hotelo (Staffordshire Street kaj Brunswick Street) estas senpagaj publikaj parkejoj. En la strato Hardres Street oni rajtas parki dum unu horo el ĉiu duhora periodo dumtage. Se sur iuj stratrandoj troviĝas flavaj strioj, ONI NE PARKU!

ANGLAJ MONEROJ

£1 = unu pundo nun entenas 100 pencojn (novajn). Notu ke kelkaj 5pencaj moneroj (la malnovaj) ankoraŭ indikas "One Shilling" kaj kelkaj 10pencaj "Two Shillings".

P R O G R A M O

SABATO

9.00 Matenmanĝo
10.00 Dokumentoj
13.00 Tagmanĝa Paŭzo
16.00 Oficiala Malfermo
18.00 Vespermanĝo
20.00 Artvespero: Reto Rossetti: Poezio
Familio Hill : Kantoj kaj Muziko

DIMANĈO

9.00 Matenmanĝo
Diservoj: detaloj sur la anonctabulo
11.00 Markola Kunveno
13.00 Tagmanĝa Paŭzo
14.00 Jarkunveno de SOEF
16.00 Urbestra Akcepto en la Civita Centro
18.00 Vespermanĝo kun la Geurbestroj
20.00 Gordonaj Friponaĵoj

LUNDO

9.00 Matenmanĝo
10.00 Promenoj aŭ Kurso
13.00 Tagmanĝa Paŭzo
14.30 Aŭtobusa Ekskurso (mendu je alveno)
18.00 Vespermanĝo
20.00 Ilustritaj Prelegoj: "Kelkaj Aspektoj de Peruo"
Eric MacCanlis
kaj "Konu ĉi birdojn"
John Rapley

MARDO

9.00 Matenmanĝo
10.00 Promenoj aŭ Kurso

1 Jacques Doyelle, 9 rue de Dunkerque,
F-59630 Bourbourg
2 S-ino M.T. Doyelle, sama adreso
3 Alberto Marmenout, Koninginnelaan 98
B-8370 Blankenberge
4 S-ino Dina Marmenout, sama adreso
5 S-ino Margareto Smith, 20 Frith Road,
GB-Dovro, Kent
6 Johano Rapley, 156 Wanstead Park Road,
GB-Ilford, IG1 3TP
7 S-ino Helga Rapley, sama adreso
8 Gordon Hawker, 66 Black Bull Road,
GB-Folkestone, Kent
9 S-ino Joyce Hawker, sama adreso
10 Fred Newenham, 35 Queens Avenue, Elms Vale,
GB-Dovro, Kent
11 S-ino Muriel Benson, Lisnalea, Seymour Road,
GB-St. Margarets-at-Cliffe,Dovro
12 Reto Rossetti, 120 Cromwell Road,
GB-Bristol BS6 5EZ
13 Reĝ G. Fidler, 7 Sergison Close,
GB- Haywards Heath, Sussex
14 F.H. Strutt, 26 Fleetwood Avenue,
GB-Herne Bay, Kent
15 David Hill, 18 Hawkenbury, GB-Harlow,Essex
16 S-ino Margareto Hill, sama adreso
17 S-ino Audrey Barnes, 46 Claremont Gardens,
GB-Upminster, Essex
18 G.H. Taylor, 144 Ella Street, Newland Avenue,
GB-HULL HU5 3AU
19 Julio Verstraeten, St. Bernardsesteenweg 1078,
B-2710 Hoboken
20 F-ino C. Peeters, Onderwijstraat 63,
B-2000 Antverpeno
21 R. Iserentant, Kerklaan 61,B-8000 Brugge
22 Fr. Couwenberg, Koninginnelaan 14,
B-8370 Blankenberge
23 S-ino A. Couwenberg, sama adreso

KONGRESANOJ

24 Ron Cliffe, 139 Bridge Road, GB-Chessington,Surrey
25 S-ino T.R. Cliffe, sama adreso
26 S-ino Carola Rossetti,120 Cromwell Road,
GB- Bristol BS6 5EZ
27 Petro J.K. Üalis, 25 London Road, GB-Maldon, Essex
28 S-ino Norah Razzell, 8 The Drove, GB-Brighton BN1 5NN
29 P. Smets, Marinisstraat 13, B-2200 Borgerhout
30 S-ino P. Smets, sama adreso
31 F-ino M. Willems, Veldmaarschalk Fochstraat 55,
B-8000 Brugge
32 Alec Venture, 55 Park Hill, GB-Carshalton Beeches,
Surrey
33 S-ino Etelo Venture, sama adreso
34 Germain Pirlot, Torhoutsesteenweg 17,
B-8400 Oostende
35 S-ino G. Pirlot, sama adreso
36 F-ino Andrée Orsolini, rue Paul Pastur 6,
B-6000 Charleroi
37 Etienne Gaudry, 99 rue du Parc, F-92140 Clamart
38 Luciano Bourgois, 25 rue Gambetta,
F-62950 Noyelles-Godault
39 Luciano Giloteaux, 3/10 allée Béranger,F-59170 Croix
40 Léon Legros, 37 rue Gillaume Tell, F-59 Lille
41 S-ino Legros, sama adreso
42 E. Green, 21 Tees Avenue, GB-Perivale, Greenford
Middx, UB6 8JJ
43 Arturo Jackson, 10 Duncan House, Harker Terrace,
GB-Stanningley, Pudsey, LS26 6BL
44 Wilf Wharton, 65 Hillyfields Road, Birmingham B23 7HB
45 S-ino Dorie Wharton, sama adreso
46 G. Debrouwere, Magdalenastraat 29, B-8500 Kortrijk
47 S-ino Debrouwere, sama adreso
48 Marcel Ries, 25 rue Gaffelt, L-Dudelange
49 F-ino Agnes George, 11 Langton Court, Langton Road,
GB-Worthing, Sussex, BN14 7BZ
50 Maurice Valluet, 14 route d'Olivet, F-45100 Orléans
51 Georgo Atkinson, 30 The Park, GB-Londono W5 5NL
52 C. Douglas Bills, 1 Brook Street, GB-Tavistock,Devon
53 S-ino C.D. Bills, sama adreso

54 F-ino M. van Mullem, Vuurkruisenstraat 12
B-8370 Blankenberge
55. S-ino Rhoda May, 88 Donald Hall Road,GB-Brighton
BN2 5DE
56 S-ino Esther Schorr, 90 Queens Park Road,
GB-Brighton BN2 2GL
57 S-ino Winifred Cooper, 391 Marfleet Lane,GB-Hull
58 Georgo Cooper, sama adreso
59 Petro A. Danning, 316B Richmond Road,
GB-Twickenham, TW1 2PE
60 William O'Brien, sama adreso
61 S-ino Mollie M. Buckle, 53 South Street,Barming,
GB-Maidstone ME16 9EX
62 F-ino Sunita Shivdasani, sama adreso
63 Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5,B-2520 Edegem
64 S-ino C. Durwael, sama adreso
65 Paŭlo Cornil, Beukenlaan 14, B-2508 Kessel
66 S-ino P. Cornil, sama adreso
67 Leo Verwecken, Lotusstraat 10, B-2610 Wilrijk
68 H. Askin, 4 Clarence Street, Ings Road, Hull
69 H. Ostler, 86 Bisley Grove, Bransholme, Hull
70 Frank Maitland, Braeside, Kenardington
GB-Ashford, Kent
71 S-ino Pat Maitland, sama adreso
72 F-ino Junio Lindsay, 12 Dobson Avenue,
GB-St. Annes, FY8 2HH
73 F-ino Renée Verbéke, 44 rue Caumartin,
F-5900 Lille
74 Fernand Ditacroute, 178 Chemin Castre,
F-62100 Calais
75 S-ino Astrid Ditacroute, sama adreso
76 Chris van Hoof (F-ineto) Dennenstraat 23
B-2800 Mechelen
77 Patrick van Hoof sama adreso
78 Eric McCanlis, 11 Woodgate House, 2 South Bank
GB-Surbiton, KT6 6DQ
79 S-ino Heather McCanlis, sama adreso
80 S-ino José Blokmans, A. Stokmanslei 81,B-2510
Mortsel

KONGRESANOJ

81 Jim Mearns, 95 Stevenage Road, GB-London E6
82 S-ino Gwen Mearns, sama adreso
83 Jacques Wilfrid, 66 Blenheim Crescent,
GB- London W11
84 Martin Hewitt, Mortlake Road, Ilford -GB
85 Christopher Baily, 42 Westgate, GB- Chich-
ester,Sussex
86 S-ino Eunice Hughes, 45 Carmel Court,
GB- Birchington,CT7 9JT,Kent

Kun granda bedaŭro ni eksciis ke nia franca reprezentanto de la Markolaj Kongresoj, S-ro Jacques Doyelle, pro profesiaj kialoj ne povas ĉeesti en Ramsgate ĉi-jare.